

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1994/2



*Multe pri kortoj  
en ĉi tiu printem-  
tempa numero*

*... kaj iom  
pri radio-  
dissendoj  
en Malmö*

# La Espero

Organ för  
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Majo 1994 • 82-a jarkolekto  
Fondita en 1913

Redaktör/redaktoro:  
Per Aarne Fritzon,  
Västertorpsvägen 154,  
129 44 Hägersten,  
tel. 08-97 47 76

Frågor om prenumeration o. dyl.:  
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1994

Prenumeration 1994: 150 kr. Gåvo-  
prenumeration till utlandet: 80 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår  
i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3,  
Esperantoförbundet.

## Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00, fax: 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla  
öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1994:  
Direktansluten medlem 150 kr.  
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.  
Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning  
*Kvinpinto*.

## Esperantoförlaget

Adress: Möllevångsgatan 20 B,  
214 20 Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar  
kl. 17-18. Skriftliga beställningar  
expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,  
Storgatan 13, 753 31 Uppsala

La Espero estas presata  sur reciklita papero.

## KLUBO MIL 1994

Norrköpings Esperantoklubb	1000
H. Sundström, Älvsjö	10 000
Kerstin Kristoferson, Stockholm	1000
Sten Broman, Skövde	1000
Gösta Hedlund, Uppsala	1000
Motala Esperantoklubb	1000

## KLUBOCENT

Alice och Nils Johansson, Norrköping	200
Britta Lindeberg, Degeberga Signild och Tore Johansson, Kalmar	200
Kalmar Esperantoklubb	100
Åke Palm, Malmö	100
Ivar Andersson, Tranås	100

## DONACOJ

Falu-Borlänge Esperantoklubb ("Al la  
memoro de niaj forpasintaj membroj Erik  
Lundvall, Paul Taüber kaj Ingrid Nord-  
löf.") 500; Stina och Fred Turner, Ljungs-  
bro 200; Margit Rudolphson, Karlshamn  
150; Inga Nothfalk, Hässelby ("Till minne  
av Erik Bohlin.") 100; Anonimaj aŭtoĝi-  
roj 150.

(La ĉi tie notitaj donacoj alvenis antaŭ la 25-a  
de marto.)

Pliaj donacoj bonvenaj al SEF, poŝtgiro  
2012-3.

## La Espero nun sur "reciklita" papero

La papero de ĉi tiu numero de *La Espero*  
ne estas same brile blanka kiel tiu de la  
pli fruaj. La kaŭzo estas, ke ni ekuzis re-  
ciklitan paperon, tio estas paperon farita  
el jam uzita papero.

Jam pli frue membroj demandis, ĉu ne  
eblus ekuzi paperon pli ĝentilan al la me-  
dio. La papero, kiun ni tiam rigardis, ha-  
vis kelkajn malavantaĝojn. Laŭ la pres-  
isto la papero nun uzata ne plu havas ilin.  
Krome, la paperfaristo garantias, ke nek  
kloro nek optika blankigilo estas uzataj  
en la fabrikado.

*La Espero* estas malgranda gazeto, sed  
per ĉi tiu ŝanĝo ni permesas, ke almenaŭ  
kelkaj arbobranĉoj plurestu en la naturo.

## ANONCETOJ

**Korespondi deziras** kun ĉiuaĝaj homoj:  
18-jara studento de pedagogia institu-  
to. Interesiĝas pri lingvoj, vojaĝoj, lite-  
raturato, aŭtoj, historio, politiko kulturo  
de diversaj landoj. Anton Golodnov,  
Timirjazeva 2-20, 460024 Orenburg,  
Rusio.

**Korespondi deziras** ok lernantoj de Es-  
peranto, en aĝoj inter 13 kaj 40 jaroj.  
Kontakto pere de ilia instruisto s-ino  
Norma Saccardo, Via Leopardi 5,  
35010 Villafranca, Italio.

**Korespondi deziras** 34-jara fraŭlino, ju-  
risto. Interesiĝas pri filozofio kaj religi-  
oj. Studas ankaŭ la svedan. Lovisa Go-  
rusova, ul. Radisjtjeva 11 kv. 13,  
183031 Murmansk, Rusio.

**Korespondi deziras** 24-jara bibliotekis-  
tino. Interesiĝas pri ĵazo, vojaĝoj, lega-  
do. Viktoria Piskovnina, ul. Knipovitja  
39 kv. 69, 18030 Murmansk, Rusio.

**19-jara studentino** pri medicino deziras  
korespondi kun fraŭlino 19-23-jaraĝa.  
Interesiĝas pri muziko, danco kaj ler-  
nado. Polina Kudenkova, a/ja 12740,  
660075 Krasnojarsk, Rusio.

**Skänk använda frimärken** till UEA. SEF  
samlar använda frimärken till förmån  
för UEA, både svenska och utländska.  
Klipp några millimeter runt märket, så  
att det inte skadas. Sänd sedan märke-  
na till Jan Ströenne, Amiralsgatan 36,  
211 55 Malmö för vidare befordran  
Rotterdam.

**Affischer bortskänkes.** Ett antal affi-  
scher (A2) med texten "Esperanto.  
Genvägen till alla folk" finns i SEF:s ar-  
kiv och kommer att bortskänkas till  
klubbrepresentanter under kongres-  
sen i Höör. Emballagerullar finns till-  
gängliga.

## Bildpoŝtkartoj 1909

Frato de iu, kiu antaŭ longe estis aktiva  
esperantisto, venis al Esperanto-Centro  
por demandi pri kartoj postlasitaj de la  
frato. Li volis scii, ĉu la kartoj de diversaj  
landoj estis skribitaj en Esperanto.

La respondo estis jesa. Do, li havas  
proksimume 50 poŝtkartojn de la jaroj  
1909 kaj 1910, kaj volas scii, ĉu iu mem-  
bro de SEF havus intereson rigardi kaj  
transpreni la "trezoron".

Se vi volas scii pli pri la (verŝajne valo-  
raj) kartoj, turnu vin al Nils Hamberg, tel:  
0281 301 18.

# La klubo de Malmö disaŭdigas Esperanton per loka radio

*Informado pri Esperanto estas grava tasko de nia movado kaj la radio estas bona rimedo. La Esperanto-klubo de Malmö ekde 1987 regule disaŭdigas Esperanto-programojn per la loka radio.*

*Dum vizito en Malmö, Anita Bergh kaptis la okazon intervjui la iniciatinton, Sten Svenonius, kiu ankaŭ estas la vicprezidanto de la klubo. La Pola Radio jam elsendis la surbendigitan intervjuon, kiun Anita nun ofertas al la legantoj de La Espero.*

**A.B.** Dum kiom da tempo semajne vi elsendas?

**S.S.** Nuntempe kvaronhoran programon semajne, kun du ripetoj. Antaŭe estis 30 minutoj, sed estis tro multekoste.

**A.B.** Vi ne estas la sola en la klubo, kiu aktivigas pri radioelsendoj. Vi havas grupon, ĉu ne?

**S.S.** Jes, kompreneble. Kiam mi en 1986 proponis al la estraro ke ni kometu pri radio, ĉiuj estis sufiĉe hezitemaj. Ĉiuj konsciis, ke estos sufiĉe granda laboro, eble iom malfacila. Sed unu membro, **Lennart Magnusson**, estis tuj preta akcepti la ideon. Li tre bone laboris dum pluraj jaroj ĝis sia retiriĝo, kaj li sekvis nin per aŭskultado de la programoj kaj kuraĝigo.

Aliaj gravaj membroj estas **Börje Nordström**, teknikisto jam de la komenco, kaj **Alvar Stenberg**, kiun ni fakte varbis per unu el la unuaj programoj: li tute hazarde aŭskultis kaj tuj aliĝis al kurso por komencantoj. Li nun de ses jaroj faras nelongan kurson por komencantoj en Radio Esperanto.

Krom la antaŭe menciitaj partoprenas ankaŭ **Bengt Hallin** kaj nia prezidanto **Per Olov Johansson**. Ankaŭ **Anna Maria Lange** el Lund longe servis por Radio Esperanto.

**A.B.** Kiamaniere vi elsendas? Ĉu la programoj ĉiam estas tute en Esperanto aŭ en la sveda lingvo?

**S.S.** La celo estas diversflanka, mi povas diri. Estas sufiĉe grave informi niajn membrojn pri ĉio, kio okazos en la Esperanto-movado, sed ni volas ankaŭ turni nin al la komencantoj. Ni klopodas forti ĝi ilin kiel eble plejmulte ĝis esperantiĝo.



**Radioaktivuloj:** Fotitaj en la studio estas kvar el la aktivuloj malantaŭ Radio Esperanto en Malmö: Börje Nordström (sidanta), Sten Svenonius, Bengt Hallin kaj Alvar Stenberg.

Krom tio ni turnas nin al la vasta publiko. Ĉirkaŭ 400–500.000 homoj loĝas en la regiono, kie entute aŭdeblas nia radio.

Do, se venas eksterlandaj gastoj, ni kompreneble intervjuas ilin en Esperanto, kun mallongaj tradukoj aŭ resumoj en la sveda. La lecionoj estas kompreneble parte esperantlingvaj kaj ankaŭ la muziko estas ofte en Esperanto. Krom tio la programo estas en la sveda, kun baza informado pri la ideo de Esperanto.

**A.B.** Ĉu vi ricevis multajn novajn membrojn pere de la radi-elsendoj?

**S.S.** Jes, ni ricevis. Kelkfoje oni aŭdas homojn, kiuj diras, ke "mi aŭdis vin en la radio". Sed laŭ mi oni ne atendu, ke tuj kreskos la membronombro en la klubo nur ĉar oni komencis pri radio. Mi pensas, ke estas malfacile mezuri la efikon de niaj programoj, ĉar povas esti iu persono, kiu estas indiferenta aŭ eĉ negativa pri Esperanto, sed post aŭskultado de nia programo havas pli favoran sintenon. Eble li membriĝas. Ni povas ĉiukaze iom eduki la publikon pri Esperanto, ĉar ni diskutas la lingvon, ke ĝi estas facile lernebla kaj logika.

**A.B.** Ĉu vi havas interrilatojn kun aliaj radistacioj, kiuj elsendas en Esperanto, en Svedio aŭ aliaj landoj?

**S.S.** Jes, el Västerås Wim Posthuma sendas al ni programojn, vi mem kontribuis, kaj materialon de Pola Radio ni ofte utiligas. Bengt Hallin surbendigas la elsendojn de Pola Radio, kiujn ni parte uzas.

**A.B.** Ĉu vi havas laboran interrilaton kun aliaj societoj, kiuj ankaŭ sendas per la loka radio?

**S.S.** Okazis, ke ni partoprenis en programoj de aliaj. Kadre de la loka radio en Malmö ĉ. 80 diversaj societoj politikaj, kulturaj kaj enmigrintulaj disaŭdigas proprajn programojn, kaj de tempo al tempo ĉiuj kunvenas por decidi pri diversaj aferoj, jarkunsidoj kaj similaj. Dank' al tiu interkonatiĝo, la Esperanto-klubo altigis sian reputacion ĉi tie en Malmö, laŭ mia opinio.

**A.B.** Laŭ vi, kio estas la plej granda avantaĝo de esperantaj radielsendoj?

**S.S.** La rapidaj informoj al niaj membroj. Krome ni povas atingi principe ĉiun hejmon en Malmö kun ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj, kiuj deziras aŭdi pri ni, povas tion fari. La programoj estas anoncitaj en la ĵurnaloj. Se iu pensas, ke Esperanto eble estas interesa afero, li havas la eblecon sidi hejme kaj ricevi informon.

Mi ankaŭ volas atentigi pri la ŝanco

por ni mem ekzerci programfaradon aŭ interjuadon. Ni lernas interjuigi kaj ne esti tro ĝenataj, se iu metas mikrofonon antaŭ nian nazon. Ni faras programoj de ses jaroj. Komprenoble oni akiras spertojn kaj alkutimiĝas al tiaj situacioj. Ni konstante alvokas la membrojn por interjuji ilin, se ili partoprenis en ekz. kongreso aŭ kurso. Tiam ankaŭ ili havas la eblecon trejniĝi, ĉar multaj estas sufiĉe nervozaj, kiam ili venas al studio kaj vidas, ke nun oni surbendigas ilian voĉon.

**A.B.** Kion vi pensas pri la estonteco? Ĉu vi planas sendi pli aŭ resti je la nuna nivelo?

**S.S.** Ni havas firman intencon daŭrigi ĉi tiun agadon. Mi jam menciis la koston. Estas iom koste partopreni en ĉi tiu afero, kaj ni kontentiĝas per 15 minutoj, ĉar tio sufiĉas por nia informado.

Krom tio estas komprenoble sufiĉe laborige fari ĉiusemajne novan programon. Fari kvaronhoran programon estas tre facile, laŭ mi. Tio iras preskaŭ per rutino. Se ni havus multe pli da mono kaj tempo, ni povus, komprenoble fari alie – ni povus havi multe pli longan programon, eble unuhoran, kun ebleco telefoni al la studio. Tio okazis foje, kiam ni havis la eblecon senkoste fari duonhoran programon. Estis tre interese.

Sed nia ĉefa decido estas daŭre disaŭdigi niajn programojn, resti en ĉi tiu agado.

**A.B.** Koran dankon por la intervjuo!

Mi sendas saluton kaj bondezirojn al la laborema kaj entuziasma radiogrupo en Malmö. Ĉu iuj aliaj estas pretaj sekvi ilian ekzemplon? Certe la skanianoj kun ĝojo dividos siajn spertojn. La baldaŭa jarkongreso estos bona okazo por tio. Tie ankaŭ videblos eta ekspozicio pri Esperanto en la radio. Do, ĝis revido en Höör!

Anita Bergh

## Denove pri la Eŭropo-kurso de Karlskoga



**Klerigo per Esperanto:** La dek partoprenantoj de la okmonata Eŭropo-kurso de la popola altlernejo de Karlskoga. Esperanto estas por ili unu el la ŝlosiloj por ekkoni nian kontinenton.

En *La Espero* 1/94 vi povis legi kiel Esperanto eniras diversajn kursojn en la popola altlernejo de Karlskoga. Unu interesa novaĵo estas la Eŭropo-kurso. En ĝi la lernantoj dum ok monatoj studas nian mondoparton el diversaj perspektivoj: historia, ide-historia, literatura kaj kultura.

Dum la unua semestro la dekpersona grupo studis Esperanton ok horojn semajne. La ceteraj studlingvoj estis la sveda kaj angla. Nun dum la printempo la lernantoj utiligas siajn Esperanto-konojn por studi ankaŭ la francan.

Dank' al sia lingvosocio pri Esperanto, la lernantoj bone povas legi pri-eŭropajn

gazetartikolojn el ekz. *Heroldo*, *Eventoj* kaj *Monato*. Kelkaj esperantistoj el diversaj eŭropaj landoj ankaŭ sendis eltondaĵojn, kiuj bonege helpis en la instruado.

La plimulto el la lernantoj venis rekte de gimnaziaj studoj kaj havas bonan sperton pri lingvolernado. Kelkaj el ili post la kurso ekstudos lingvojn, kaj certe ili estontece povas kaj reklami pri Esperanto kaj instrui ĝin.

Dum la pasko du junulinoj vizitis esperanto-renkontiĝon en Lemele, Nederlando, kaj komence de majo la tuta grupo iros al Prago, kie oni i.a. kontaktos kun lokaj esperantistoj.

Laŭ informoj de Lars Forsman

## En tusenlapp över?

Investeri den i Esperantoförlaget! Esperantoförlaget kan inte ge ut en enda bok om inte andelskapitalet ökar rejält. Kan du hjälpa till – antingen genom en egen insats eller genom att få din förening engagerad? Det finns nya andelsbevis till värdet av 500, 1000 och 10 000 kronor. Du och/eller din förening får teckna hur många bevis som helst.

Din insats kommer dig och andra esperantister till godo i form av nya ord- och läroböcker, noveller och romaner, bokkassetter och annat.

Esperantoförlaget · Möllevångsgatan 20 B, 214 20 Malmö · Postgiro: 578-5

# Kio estas merkato?

En *La Espero* 6/1993, Per Aarne Fritzon petas pardonon. Li en antaŭa numero estis trafita de "falsa amiko", ĉar li uzis la vorton *pulmerkato* anstataŭ *pulbazaro*. Tio ne surprizas, ĉar PIV, kiu ofte estas konsiderata normiga, donas neuzeblan difinon de *merkato*. Tiu difino eĉ malakordiĝas kun la ekzemploj en PIV! Do, ĝi ne donas helpon al la lingvouzanto. Krome, en pluraj grandaj naciaj lingvoj la etimologie sama vorto kiel *merkato* havas sufiĉe vastan difinon. Tiu vorto aperas en nacilingvaj esprimoj por *pulbazaro*.

La vorto *merkato* ne estis uzata de Zamenhof kaj ne troviĝas en la origina Universala Vortaro, sed aperas en la Kvara Oficiala Aldono (laŭ *Vilborg, Etimologia Vortaro de Esperanto*, vol. 3.)

## Merkato en PIV kaj PV

PIV diras: "*merkato* 1 *Aĉetkapablo de unu homgrupo, aŭ de la bezonantoj de unu varo.*" Poste ĝi donas plurajn ekzemplojn, i.a. "*la Eŭropa merkato (Eŭropa ekonomika komunumo)*".

En tiu ĉi ekzemplo (kie, cetere, *ekonomika* devus esti anstataŭigita per *ekonomia*) estas evidente ke merkato havas alian signifon ol "*aĉetkapablo...*". La klariga parentezo tuj post la ekzemplo konfirmas tion. Do, la ekzemplo ne harmonias kun la difino.

Aliajn ekzemplojn sub 1 estas pli facile interpreti laŭ la strikta difino de PIV, sed tamen estus ofte maloportune ne povi doni al merkato pli vastan signifon. Ekzemple, ni volas paroli pri "*la merkato de lano*" (ekzemplo donata en PIV) ankaŭ kiam ni aludas la tutan komplekson de postulado kaj ofertado de lano kaj de la ĉirkaŭaj aranĝoj. (Kiel ni esprimus la ideon de tiu ĉi komplekso, se merkato signifus nur aĉetkapablon...?)

"*Aĉetkapablo...*" estas difino numero 1 de merkato en PIV. Ni trovas sub 2: "*Ĉe la borso, stato de la oferto k mendo.*"

Estas interese ke nun kiam

temas pri la borso, la difino estas vastigita. Kaj la oferto kaj la mendo ja inkludiĝas, dum nenio kio rilatas al oferto troviĝas sub 1. Kial ofertado inkludiĝas nur kiam temas pri borsa komercado kaj ne kiam temas pri komercoj pri vestaĵoj aŭ ludiloj?

Do, la artikolo pri merkato en PIV estas diletanteca. La artikolo en Plena Vortaro estas pli bona. La difino tie estas pli larĝa kaj bone harmonias kun la efektiva lingvouzo: "*Merkato. Sfero de vendo, kampo de komerca agado pri aparta branĉo.*" Ekzakte la samajn vortojn (plus parentezan aldonon: "neniam signifas placon aŭ ejon") ni trovas en la Kvara Oficiala Aldono 1929. Estas enigmo ke PIV ne akceptis tiun ĉi difinon.

## "Merkato" en naciaj lingvoj

Mi diris enkonduke ke ankaŭ naciaj lingvoj, kiuj havas la etimologian ekvivalenton de merkato, uzas la vorton en pli vasta senco ol PIV permesus. Ofte "*merkato*" aperas ankaŭ en la nacilingvaj vortoj por pulbazaro. Ni vidu la enkondukajn difinojn de *market* (angla), *Markt* (germana), *marché* (franca), *mercado* (hispana) kaj *marknad* (sveda) en kelkaj fakvortaroj aŭ

enciklopedioj. Ni ankaŭ vidu kiel *loppmarknad* (sveda por pulbazaro) estas tradukita en kelkaj ĝeneralaj svedaj-alilingvaj vortaroj:

*Market.* A medium for exchanges between buyers and sellers. Some markets are physically located in one place; others connect buyers and sellers by telephone, fax and telex. (D Rutherford, Dictionary of Economics.)

*Market.* A market exists when buyers wishing to exchange money for a good or service are in contact with sellers wishing to exchange goods or services for money. Thus, a market is defined in terms of the fundamental forces of supply and demand, and is not necessarily confined to any particular location. (The Penguin Dictionary of Economics.)

*Loppmarknad* flea market, second-hand [junk] market, jumble sale. (Stora svensk-engelska ordboken.)

*Markt.* 1. Platz, an dem Verkäufer und Käufer, Erzeuger und Verbraucher sich zu Handelszwecken treffen, z.B. der Marktplatz.

2. in den Wirtschaftswissenschaften der ökonomische Ort des Tauschs bezüglich eines bestimmten Gutes unter dem Aspekt der Preisbildung, ohne daß eine örtliche oder zeitlich feststehende Marktveranstaltung vorzuliegen braucht. (Humboldt-Wirtschafts-Lexikon.)

*Loppmarknad* Flohmarkt, Trödelmarkt. (Stora svensk-tyska ordboken.)

*Marché.* Contrat comportant vente et achat, ou louage de biens, de services ou de capitaux....

Lieu de rencontre entre l'offre et la demande de biens, de services ou de capitaux....

• Ensemble des opérations intéressant un domaine ou un lieu d'échanges particulier....



Ĉu bazaro aŭ merkato?

- État et évolution de l'offre et de la demande dans un domaine donné....
- Ensemble des conditions qui commandent la production et la commercialisation d'un produit....
- Pays ou zone de production....
- Débouché virtuel pour des producteurs. (Y Bernard & J-C Colli, Vocabulaire économique et financier.)

*Loppmarknad* marché aux puces. (Norstedts svensk-franska ordbok.)

*Mercado*. Conjunto de transacciones que se realizan entre los compradores y vendedores de un bien o servicio; vale decir, es el punto de encuentro entre los agentes económicos que actúan como oferentes y demandantes de bienes y servicios. El mercado no necesariamente debe tener una localización geográfica determinada. (538 términos económicos de uso habitual.)

*Loppmarknad* mercado de viejo; [i Madrid] el Rastro. (B Cederholm & N Sund, Svensk-spanskt lexikon.)

*Marknad*. Komplex av köpare och säljare av en viss nytthet (i vid mening) samt de arrangemang genom vilka köpare och säljare kan mötas och göra affärer. (H Dickson, P A Luukkainen & B Sandelin, Termer i nationalekonomi.)

En neniŭ el la supraj nacilingvaj difinoj "merkato" estas tiel malvaste difinita kiel en PIV. En la menciitaj vortaroj ĝi estas ankaŭ pli vaste difinita ol en Kvara Oficiala Aldono, ĉar aludo pri certa loko ne estas ekskludita. Krome, la nacilingvaj etimologiaj ekvivalentoj de merkato estas parto de la nacilingvaj terminoj por pulbazar.

Uzantoj de esperanto, same kiel uzantoj de naciaj lingvoj, certe estas influataj de aliaj lingvoj. Novaj vortoj kaj novaj parolturnoj enŝteliĝas de ekstere. La enhavo de certa nacilingva vorto ofte ŝanĝiĝas dum jardekoj pasas. Estus mirinde se ne estus simila tendenco ankaŭ en esperanto.

Tio kondukas al granda demando, kiun mi ne provu respondi: Ĉis kia grado vortaristoj kaj aliaj personoj en lingvonormiga pozicio registru kaj transigu observitajn tendencojn, kaj ĝis kia grado ili anstataŭe provu gardi la pli originan lingvouzon? Ĉu oni, ekzemple, akceptu ke post influo de multaj grandaj naciaj lingvoj la vorto *pulmerkato* estas uzata apud *pulbazar*o?

Bo Sandelin

## Distingu inter evoluo kaj fuŝo

Estante eble iom malpli humila persono ol Bo Sandelin, mi arogas ĉi tie tuj donian personan opinionon pri la demando starigita fine de lia artikolo. (Finfine ni ja daŭre parolas pri eraro farita de mi!)

Unue necesas citi iom da fremdlingvoj ankaŭ koncerne la alian vorton, nome *bazar*o. En la Universala Vortaro, Zamenhof donis jenajn kvin nacilingvajn tradukojn de ĝi: *marché, foire* (franca); *market, fair* (angla); *Markt* (germana); *bazar* (rusa) kaj *targ, rynek* (pola).

Do ne povas esti dubo, ke la sola ĝusta maniero traduki la svedan vorton *marknad* – en ĝia konkreta senco – estas per la fundamenta vorto *bazar*o. La vorto *merkato* esprimas tute alian, abstraktan senco de *marknad*.

La kaŭzo, ke svedaj esperantistoj (inkluzive min mem) tamen ofte erare diras *merkato* kiam ni celas *bazar*o, kompreneble estas la fakto, ke en la sveda ambaŭ nomiĝas *marknad*. La samo validas por parolantoj de pluraj grandaj okcident-eŭropaj lingvoj. Pri tio tute pravas Bo Sandelin. Sendube nin svedoj ankaŭ influas la fakto, ke en nia lingvo la vorto *bazar*o havas signifon multe pli specialan kaj limigitan ol la vorto *bazar*o havas en Esperanto.

Tio estas klarigo, sed ne ekskuzo. Ni ĉiuj scias, ke Esperanto estas neĝepatra lingvo por la absoluta plejmulto el siaj uzantoj. Ni ankaŭ devas konfesi, ke plej multaj esperantistoj ne regas la lingvon tre bone. Pro tio ni devas aparte atente distingi inter unuflanke signoj de natura evoluo kaj aliflanke simplaj eraroj, ĉu kaŭzitaj de nacilingvaj influoj aŭ ne.

Ĉiuj lingvoj, ankaŭ Esperanto, evolu-

as kaj ŝanĝiĝas por adaptiĝi al novaj tempoj kaj novaj bezonoj. Sed ne ĉiuj ŝanĝoj estas utilaj kaj dezirindaj. Foje ili estiĝas ne pro bezono, sed pro malzorgemo, kaj tiam ili riskas fuŝi tiajn distingojn kaj signifojn en la lingvo, kiujn oni post iom da pripenso certe preferus konservi.

Ĝuste pro tio "vortaristoj kaj aliaj personoj en lingvonormiga pozicio" havas la delikatan respondecon rekoni kaj helpi tiujn evoludentojn, kiuj kondukas al pli klara kaj pli efika komunikado, sed malhelpi tiujn, kiuj male minacas konfuzi kaj malriĉigi la lingvon.

Alikaze ni ja devus akcepti ekz. la oftegan eraron diri "amasmedioj" anstataŭ la rekta *amaskomunikiloj*. Se oni argumentas, ke tia uzo de *medio* estas defendebla, ĉar ĝi sekvas la modelon de grandaj naciaj lingvoj, oni forgesas, ke tia akcepto komplete ruinigus la kutiman senco de la vorto *medio* en Esperanto. Tiam anstataŭ du malsamaj vortoj por du malsamaj aferoj, ni havus unu vorton kun tre nebula signifo, kaj Esperanto estus malpli riĉa ol antaŭe. (Ankaŭ kompare kun la "modelaj" nacilingvoj, kiuj ja daŭre ĝuus la avantaĝon de malsamaj vortoj por *medio* respektive *komunikilo*).

Tion neniŭ vere deziras. Ni ne forgesu, ke Esperanto konsistigas aŭtonoman lingvosistemon. Estante la efektivaj portantoj de la lingvo Esperanto, ni ĉiuj havas "lingvonormigan pozicion". Se ni restas konsciaj pri tiu respondeco kaj investas iom da serioza atento al lingvaj nuancoj, ni pludonos ĉiam pli bonan lingvon al niaj posteuloj.

Kiel ordinaraj uzantoj de Esperanto, ni ekde nun simple memoru, ke aro da vivantaj vendistoj, kiuj en certa loko en la fizika mondo ofertas siajn varojn en budoj aŭ ĉe vendotabloj, kune konsistigas *bazar*on; dume *merkato* estas ekonomika termino por abstrakte priskribi la sferon de aĉetado kaj vendado, oferto kaj mendo, ĉu de certaj varoj aŭ ĝenerale.

*Pulbazar*oj ofte renkonteblas. Eble iu komerca geniulo iam sukcesos krei ankaŭ *pulmerkato*n. La du aferoj tamen restos malsamaj.

Per Aarne Fritzon



# Ebbe Vilborg om lexikografens bekymmer

Sten Johanssons insändare i *La Espero* 1/1994 tar upp ett problem som måste bekymra varje lexikograf, nämligen hur ordförrådet skall kunna bli så aktuellt som möjligt. Speciellt besvärligt är kanske situationen för en som utarbetar en esperanto-ordbok, eftersom intervaller mellan upplagorna brukar var långa och referensverken få.

För OSE (*Ordbok Svenska-Esperanto*) har jag försökt få med de viktigaste orden ur svenska språknämndens *Nyord i svenskan från 40-tal till 80-tal* (Esselte Studium 1986); modernare än så är alltså inte ordboken.

Men det finns en annan omständighet som är särskilt kännbar för esperantolexikografen: man bör helst veta att ett ord eller uttryck existerar, innan man sätter in det i ordboken! Att översätta skinhead ("stoplokapulo?") utan att ha sett det användas i esperantotext och utan att veta om språkbrukarna kan tänkas förstå det, förefaller ganska meningslöst. Därför behövs alla aktiva läsande och lyssnande esperantisters medverkan för att hjälpa sådana brister och fylla luckorna. Men jag är inte sämre än att jag kan ge några förslag:

*bärsele* – portebla bebbeŝo; *crème fraîche* – acideta kremo; *drogfri* – sentoksik/a, -igita; *hemtjänst* – vizita helpservo; *kebab* – kebabo; *liggunderlag* – kuŝsternaĵo; *portkod* – enirkodo; *spånskiva* – lameno el aglomeraĵo...

Vad beträffar möjligheten att komplettera dataversionen, hänvisar jag till vad som sägs i förordet, sid vi. Här är det naturligtvis förlaget som har det avgörande ordet.

Kommentarer till några enskilda fall som nämns i Sten Johanssons insändare:

*PC* finns, fast i formen *persondator*. Vad beträffar datatermen *fil* så är ordet *rikordaro* i Münnich, som jag uppger att jag har använt (sid. vi). Det är dessutom det enda ordet för *fil* i Bertins Computer Dictionary English-Esperanto. *Dosiero* har redan två betydelser i PIV (märk också dosierujo "pärm"); att lägga till en tredje kan bli för mycket av det goda. Men om språkbruket på denna punkt är entydigt, skall det na-

turligtvis in i ordboken.

Beträffande *piplärka* har Sten Johansson otvivelaktigt rätt; men det är viktigt att påpeka att *antuso* står i PIV. Det samma gäller *etniö* och *marŝaŭmo* (med hänvisning till synonymer). En fullständig överensstämmelse med PIV har inte eftersträvats, ännu mindre med dess supplement, som fått utstå hård kritik. I båda finns åtskilliga ganska onödiga synonymer, t.ex. *prefaco*, som inte säger ett dugg mer än det väl inarbetade *antaŭparolo*. *Krepiti* är ett (latinskt) onomatopoetiskt ord som snarast ger en vagare ljudimitation än *kraket(ad)j*, som det skall motsvara. Osv.

*Germana Esperanto-Revuo* hade för många år sedan en spalt som hette "Aktuala terminareto", där färskna nyord översattes till esperanto. Kanske är det dags för *La Espero* att öppna "Aktualaj kompletigoj/korektoj al la vortaro"!

Tack för tipset! Något sådant kan möjligen bli aktuellt längre fram. Men glöm inte att Ebbe Vilborg lovat att även i fortsättningen regelbundet besvara frågor och synpunkter kring ordboken här i tidningen. Är det alltså något du undrar över, skriv till: Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg.

Vad beträffar *nyord* och tidsaktuella uttryck i allmänhet, hoppas jag att *La Espero*-läsarna flitigt ska medverka i spalten *Traduku!*, vårt fortlöpande översättningsseminarium. Ju fler som bidrar till diskussionen och det kreativa arbetet där, desto större är chansen att tillsammans hitta nya uttrycksmedel som verkligen kan komma alla språkbrukare till godo på längre sikt. Att föra in nya ord och uttryck i ordboken blir ju, som Ebbe Vilborg påpekar, aktuellt först i ett senare skede, nämligen då de visat sin livskraft genom att verkligen tas upp i det levande språket.

F.ö. kan jag tillägga att jag ofta hört skinheads kallas för *haŭtkapuloj* i talad esperanto.

Ebbe Vilborg

- Red.

Etimologia 1	100 kr
Etimologia 2	120 kr
Etimologia 3	120 kr
<b>Sume</b>	<b>300 kr</b>

[Evidente iu dormis en la lernejo dum la lecionoj pri matematiko, sed tio ne ĝenu vin: kaptu la okazon kaj havigu la tri jam aperintajn volumojn por ĉi tiu favora prezo. Ĝi eĉ enhavas sendkostojn kaj varimposton!]

Eldona Societo Esperanto

Möllevångsgatan 20B, 214 20 Malmö  
Telefon: 040-12 20 29 · Postgiro: 578-5

# Ne ĉiam belas la realo

Ĉu eble la abomena krimo pritraktita en la pasintnumera ekzerco fortimigis iujn tradukemulojn? Ĉi-foje nome partoprenis ne same multaj kiel kutime. Nu, la realeco ne ĉiam tre belas. Ne volante esti cini-kaj, ni povas nur rekomendi, ke oni konsideru ekzercon ekzerco, sendepende de la enhavo.

Unu fidela partoprenanto estas Sten Johansson, kiu krome ofte aldonas interesajn komentojn kaj konstruan kritikon. Okaze de la pasinta ekzerco, li opinias, ke niaj komentoj kaj rekomendoj foje estas tro rigoraj: "Se vi ne toleras 'psikan perfor-ton', kredeble vi neniam en la vivo spertis tro fortajn *psikajn batojn*. Gratulinde!". Li ankaŭ volas "reciproke rigori": "Ankaŭ mi volis 'malpaki la kestojn', sed PIV permesis al mi nur malpaki (elpaki) la *enhavon* de la kestoj!". Li finas per demando, ĉu la lingvo ne devus akcepti tiajn etajn ambiguaĵojn.

Nu – kiom ajn psike batitaj, ni tamen certe ne volas kateni la lingvon aŭ malpermesi lingvajn figurojn. La kaŭzo por nia malrekomendo de ĝuste *psika perfor-tado* aŭ *psika perfor-taĵo* estis, ke la vorto *perfor-to* jam en si mem estas formita en tre speciala maniero kaj kvazaŭ perorele tiritita al sia kutima signifo. La afero ŝajnus pli simpla, se tiu koncepto havus propran radikon.

Koncerne la pakadon, ni konstatas, ke en PIV troviĝas la zamenhofa frazo "jam prete pakitaj estas ĉiuj sakoj", dum la kompilaĵo *Zamenhofa Ekzemplaro* jene citas el la Andersen-tradukoj: "Li pakis sian tornistran". Kion rajtis Zamenhof, tion rajtas ankaŭ Sten Johansson kaj ni!

Nun al la nova tradukdefio. Vi jam scias: Traduku ĝin al bona Esperanto kaj sendu ĝin al **Per Aarne Fritzon** (adreso sur p. 2) antaŭ la 15-a de junio:

## "En av årets stora

Eva Ginessburgs och Peter Torbiörns-sons "Tango Lima" kommer att räknas som en av årets och 90-talets stora dokumentärer. Den handlar om det svenska tionde kompaniet i Tuzla, Bosnien.

Det känns alltid på något sätt otillbörligt att beskriva, analysera och recensera filmer som denna, eftersom det oundvikligen medför att man förvandlar existensuell verklighet och ojämförbara upplevelser till estetiska objekt. Men det finns ingen väg förbi. Det är filmen jag sett. Verkligheten där borta kan jag inte nå och inte recensera.

Det börjar idylliskt och paradmilitäriskt hemma i Sverige med övning och drill, stram disciplin och prydliga uniformer. Hjälmarna är så blanka och blå. "Gomidda, FN-soldater", ropar löjtnanten. "Gomidda, löjtnant", skriker alla soldaterna tillbaka och allt är förankrat i en välkänd, trygg och sliten filmkliché.

Sedan är vi plötsligt bara i den andra verkligheten, där allt är annorlunda, där uniformerna tappat glansen och skratten blivit hysteriskt väldiga. Klaustrofobin klämmer samman blicken, och skrällen, själva naturen, tycks förvandla tillvaron till ett ödelandskap av snösörja och förtvivlan." (El *Dagens Nyheter* 16/4 1994)

Ĝis, kaj bonan sukceson!

Per Aarne Fritzon  
Bertilo Wennergren



*Dekstre sekvas propono de traduko de la teksto en La Espero 1/94. (Ĝi estas kompilita el esprimoj el la alsenditaj tradukaĵoj, krom en tiuj kazoj, kiam ni havas fortan motivan rekomendi alian vortumon.) Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn de iu esprimo aŭ frazo. Angulaj krampoj, kiel en "lernejestr[in]o", indikas eblan sed ne nepran aldonon. La ciferoj referencas al la subaj komentoj. (Se vi malkonsentas pri io, ni bonvenigas viajn reagojn!)*

La polico enketas pri la rolo / esploras la rolon de Tonya Harding, ĉampionino pri arta sketado<sup>1</sup>, en la [surpriz]atako/aten-co<sup>2</sup> kontraŭ ŝia plej akra/severa konkuran-to/rivalo, Nancy Kerrigan, raportas usona televida kompanio.

Ĝis nun oni arestis<sup>3</sup> tri personojn, inter kiuj troviĝas la korpogardisto Eric Eckardt. Kosciencriproĉoj/rimorsoj rompis tiun 150-kilograman giganton/koloson, kaj li komencis rakonti pri la atako kaj kiel ĝi estis planita.

Laŭ gazetaraj raportoj, Eckardt ankaŭ rekte akuzis la edzon de Harding, Jeff Gillooly, ke tiu<sup>4</sup> kunplanis la atakon / partoprenis en la planado de la atako. Laŭ gazetaraj informoj, Eckardt diris ankaŭ, ke Harding mem estas enmiksita, sed tion konfirmas nek la polico nek advokatoj.

Gillooly estas pridemandita de la polico, sed ne arestita. Li kaj Tonya Harding asertas, ke ili estas senkulpaj pri la pasintsemajna atako, kiam la genuo de Kerrigan estis frakasita, kio malebligis al ŝi partopreni<sup>5</sup> en la elekta konkurso por la olimpikoj en Lillehammer.

Kerrigan diras, ke ŝi ne povas kompreni, kiel eblas esti tiel malica, ke oni frakasvundas konkuranton. Pri la perspektivo, ke en Lillehammer ŝi eble reprezentos Usonon kune kun Harding, Kerrigan diras, ke ŝi havas nenion por preparoli kun Harding.

1. Sketi = gliti, glitkuri, glitumi. Parolante pri aparta sporta branĉo, sketi tamen ŝajnas preferinda.
2. En niaj vortaroj, atenco estas uzata ĉefe pri mortigcelaj kaj/aŭ politikaj atakoj, sed eble ĝi taŭgas ankaŭ ĉi tie.
3. Iu tradukinto volis traduki *gripa* per *kapti*. La sveda *gripa* tamen estas strikte jura termino kaj tradukiĝas per *aresti*. (Ordbok Svenska-Esperanto fakte ne donas tradukon por tiu senco de *gripa*, sed jes havas la kapvorton *arrestera*, kvankam la sveda leĝaro ne konas tian terminon...)
4. En ĉi tiaj okazoj oni kutime uzas li por antaŭa subjekto (Eckardt), kaj tiu por alia persono (Gillooly).
5. Unu el la kontribuintoj proponis laŭ klasika zamenhofa uzo: "(estis frakasita), ke ŝi ne povis partopreni..." Tiaj ke-frazoj (= tiel ke) estas nuntempe maloftaj, sed eble meritas plian uzon.



### Erik Bohlin

Erik Bohlin de Upplands Väsby forpasis en februaro post longa malsano. Li estis unu el la fondintoj de la Esperanto-kluboj de Skövde kaj Väsby. Ne nur lia lingvokono estis granda, sed ankaŭ lia zorgemo pri la lingvo. Ni perdis lertan esperantiston, kulturitan homon kaj karan amikon.

*Ole Hansen*

### Lennart Magnusson

Kun granda bedaŭro ni sciigas, ke unu el la plej konataj kaj ŝatataj membroj de Klubo Esperantista de Malmö ne plu estas inter ni.

Lennart Magnusson fariĝis membro de nia klubo en 1937 kaj estis ekde tiam unu el niaj plej fervoraj kaj entuziasmaj membroj, ĉiam preta kunhelpi en la klubo vivo, kaj ĉiam serĉanta novajn ideojn por informi pri Esperanto.

Ni ĉiuj konstante gardos la memoron de kara amiko kaj membro. Li ripozu en paco.

*Anna-Greta kaj Jan Strönne*

### Paroliga semajnfino en arbara kabano

Klubo Esperantista de Oslo invitas al paroliga semajnfino 11–12 de junio 1994.

Kursgvidanto estos Tamiko Kaŭakami Nielsen. La kurso okazos plene en Esperanto, do oni konu minimume la bazajn gramatikon kaj vortprovizon.

La kurso okazos en kabano en la arbaro ekster Asker, 25 km sudokcidente de Oslo.

Oni prenu trajnon de la centra stacidomo de Oslo je la 9h15 sabate por alveni en Asker je 9h48. De tie oni transportos la partoprenantojn per aŭto.

Ĉiuj estas bonvenaj, sed aliĝu frue pro manko de lokoj (maksimume 15 personoj povos partopreni).

Kotizo: 300 NOK. Duona prezo por studentoj kaj senlaboruloj.

### Tre bonaj studlibretoj

Jam aperis informoj pri la efikaj, variaj kaj vere interesaj Esperantokursoj por svedoj kaj ne-svedoj, kiujn aranĝas la popola altlernejo de Karlskoga.

Ĉiuj partoprenantoj atestas, ke la kursoj estas tre fruktodanaj, sed certe dependas de bona gvidado, sed kontribuas ankaŭ la uzo de du vere bonaj kursolibretoj verkitaj de la kursgvidanto Lars Forsman.

La unua estas por komencantoj. La li-

breto enhavas multajn bildojn, kiuj estas lerte kombinitaj kun aŭ gramatikaj reguloj aŭ bone aranĝitaj demandoj. Tia sistemo tre helpas al la studentoj kaj rapide vekas intereson pri la lingvo.

La dua turnas sin al la progresantoj, kaj la teksto enhavas vere interesan rakonton pri la vivo de L.L. Zamenhof. Estas vere lerte ne uzi kiun ajn tekston, sed jam rapide informi pri Zamenhof. La teksto enhavas ankaŭ vere bonajn kaj efikajn regulojn kaj ekzemplojn.

Mi gratulas al la popolaltlernejo pro tiaj helpiloj.

*Jan Strönne*

# Lär esperanto på Karlskoga folkhögskola

**Sommarkurs 13–18 juni 1994**

Fyra nivåer: nybörjare, fortsättare, lägre och högre konversation.

Undervisning 6 timmar per dag med svenska och utländska lärare. Det talade språket står i centrum med direktmetod och bilder.

Modern och trivsamt skola i vacker omgivning.

**Obs!** Även kombinerad nybörjar- och metodkurs för språklärare och lärare med intresse för internationella frågor. Utmärkt för ferietjänstgöring!

#### Kostnader för sommarkursen:

A. Tvåbäddsrumsrum, måltider och studier	2500 kr
Tillägg enkelrum	400 kr
B. Endast lunch, kafferaster och studier	1000 kr
Studielitteratur	50 kr
Anmälningavgift inkl. kurskostnader	100 kr

Anmälan senast 1 juni till postgiro 13 03 56 - 9, Karlskoga folkhögskola. Ange namn, adress, telefon och födelsedatum.

Ytterligare information från Karlskoga folkhögskola, Box 192, 691 24 Karlskoga, tel: 0586-503 60 (vx).

Fråga också om våra 8-veckorskurser i esperanto: en nybörjar- och en fortsättningskurs varje termin.

### På hög post i Europarådet

Den 12 april valde Europarådets parlamentariska församling svensken Daniel Tarschys till rådets generalsekreterare för fem år. Den 51-åriga statsvetaren och folktopartistiska riksdagsmannen blev därmed den första nordbon på denna höga post.

Rådets medlemmar var säkert medvetna om Daniel Tarschys meriter som parlamentariker, vetenskapsman och expert på Östeuropafrågor. Säkert har man också tagit intryck av hans språkkunskaper, även om man kanske inte kände till att han förutom engelska, franska, tyska och ryska även behärskar – esperanto.

När SEF år 1987 firade esperantos 100-årsjubileum med att hålla sin årskongress i Riksdagshuset i Stockholm, höll Daniel Tarschys till deltagarnas överraskning ett hälsningsanförande på flytande esperanto.

Det visade sig att den tidigt internationellt inriktade Daniel Tarschys som pojke lärt sig esperanto som första främmande språk. Han använde sedan språket flitigt till brevväxling med utlandet och deltog även i esperanto-världskongressen i Köpenhamn 1956.

### Tutmondaj infandesejnaĵoj en Tibro

Bona reklamo pri la eblecoj de Esperanto estis ekspozicio pri infandesejnaĵoj en Tibro.

Stig Kinnander kaj Tell-Inge Leandersson per anoncoj en tri Esperanto-gazetoj invitis infanojn el la tuta mondo sendi desegnaĵojn pri la ĉiutaga vivo. Alvenis pli ol 300 desegnaĵoj el 21 landoj.

En kunlaboro kun la junulara por-misia asocio SMU (Svenska Missionsförbundets Ungdom), la iniciintoj faris dusemajnan ekspozicion kun la 200 plej bonaj desegnaĵoj. La plej multaj, 65, venis el por-infana artlernejo en la ĉina milionurbo Nanchang. Elstarajn lokojn prenis ankaŭ verkoj el Nov-Zelando, Uzbekistano kaj Estonio.

La ekspozicion vizitis ĉ. 500 personoj

kaj krome 40 lernejoj kun 800 infanoj. Precipe inter la instruistoj la eĥo estis granda. La iniciintoj kaptis la okazon disdoni broŝurojn pri Esperanto kaj informi pri la lingvo.

La liber-eklezia studasocio Frikyrkliga studieförbundet poste transprenis la ekspozicion por aranĝi turneon tra okcidenta Svedio.

*Börje Andersson*

### Amikurba agado en Skövde

Dum sia ĵus pasinta jarkunveno, la Esperanto-klubo de Skövde decidis labori por starigi rilatojn kun la amikurboj de Skövde. Temas pri Halden en Norvegio, Ringsted en Danio, Tyrvää Vammala en Finnlando kaj Kuresaare en Estonio.

La klubo en Skövde nun havas 58 membrojn. La jarraporto pri 1993 informis pri tre varia agado kaj tri kursoj.

Karl-Gustaf Gustafsson reelektiĝis prezidanto. Ceteraj estraranoj estas Kurt Frisk, Sten Broman, Hilgon Frisk kaj Carl-Erik Ohlsson.

*Börje Andersson*

### Gotenburgo aktiva hieraŭ kaj hodiaŭ

La kluboj en Gotenburgo kaj Kungälv kune funkciigis ne malpli ol 10 diversajn kursojn dum 1993. Jen unu faceto el la aktivecoj, kiujn resumas la jarraporto de la kunlabor-organizo Esperanto-alianco de Gotenburgo.

Rezulto de aktiva laboro estas ankaŭ la svedlingva libro Esperantorörelsen i Göteborg 1892–1992, kies manuskripto nun pretiĝis. En 10 ĉapitroj (141 paĝoj) ĝi priskribas la 41 Esperanto-klubojn kaj -grupojn, kiuj agis pri Esperanto en Gotenburgo dum 100 jaroj. La projekto komenciĝis kiel studrondo en 1991, sed baldaŭ la verkantoj – Christer Lörne-mark, Märtha Andréasson, Ebbe Vilborg kaj Ralf Jalming – povis konstati, ke la fontmaterialo (gazetoj, protokoloj ktp.) estis multe pli abunda ol ili antaŭsupozis.

Restas la korektado de la manuskripto kaj trovo de presisto.

## Jubilea konkurso de Pola Radio

Por festi la 35-jariĝon de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio (kiu okazis la 4-an de aprilo 1994), la Esperanto-redakcio invitas ĉiujn esperantistojn al konkurso.

La tasko estas respondi al almenaŭ unu el sekvaj demandoj:

- Kio instigas vin aŭskulti la E-elsendojn de Pola Radio kaj kian signifon ili havas por vi?
- Kion vi opinias pri la rolo kaj signifo de la E-elsendoj de Varsovio en la tempo de grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj strebado al partnereca-paca kunlaboro sur nia kontinento?
- Kigrade la E-elsendoj de Pola Radio – fone de viaj nacilingvaj amaskomunikiloj – proksimigas al vi la bildon de Pollando?

La amplekson de la respondoj la partoprenantoj mem decidu.

La konkursaĵojn oni sendu antaŭ la 30-a de junio 1994 al la adreso: Pola Radio, Esperanto-redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

Inter la aŭtoroj de la plej interesaj respondoj oni lotumos unu specialan premion en formo de fasko de magnetofonaj kasedoj kun elektitaj intervjuoj kaj literaturaĵoj el la arkivo de nia E-redakcio. Krome oni lotumos E-librojn, popolartaĵojn, muzikkasedojn kun E-kantoj, ktp.

Ne forgesu aŭskulti la elsendojn de Pola Radio!


Du elsendoj tage:

posttagmeze je 15h00 (25,39 m; 31,45 m; 31,50 m; 48,90 m = 11815 kHz; 9540 kHz; 9525 kHz; 7145 kHz; 6135 kHz)

kaj vespere je 22h30 (48,90 m; 50,04 m; 200 m = 6135 kHz; 5995 kHz; 1503 kHz)



# Krucvortenigmo



Kompilis: Lennart Persson

Horizontale:

1. Ŝi skribas
2. Senfinaĵo - Valora (rad.)
3. Lumigilo
4. Brasike - Doktrina
5. Kredas - Elektra unu'
6. Komenco de kreto - Parto de piedo
7. Berarbede - Prepozicio
8. Sangovaze - Part' de preĝejo
9. Malplenaĵon - Florej'
10. Longa tempo - Fari truon

Vertikale:

- A. Fidul' al tekniko
- B. En mato - Teorie
- C. Akre ekkrii - Ĝenanta sono
- Ĉ. Surŝipan demandon
- D. Tenil' - Iueca - Ĉambro
- E. Skribaĵ' - Alta mont'
- F. Danĝeron
- G. Movos sin - Islamano
- Ĝ. Natrio - Pagil' - Laŭ fakto (rad.)
- H. Beligaĵon - Adoratul'

# EXTRA REA!

## Ännu fler lågprisböcker!

**Aldrig  
tidigare  
så  
billigt!**

Beställ för minst 100 kr,  
så bjuder vi dessutom på  
porto. Vid mindre beställning  
lägg till 20 kr.

ESPERANTOFÖRLAGET  
Möllevångsgatan 20 B,  
214 20 Malmö  
Postgiro 578-5

Vissa titlar finns bara i enstaka  
exemplar. Först till kvarn...

Aniario, inb.	50:-
Antologio de maltaj poetoj	25:-
Ĉu ni kunvenis vane?	40:-
Faktoj kaj fantazioj	80:-
Ili kaptis Elzan!	30:-
Inter sudo kaj nordo	10:-
Islandaj pravocoj, inb.	15:-
Islandaj pravocoj, häftad	10:-
Jaroj sur tero, inb.	15:-
Jaroj sur tero, häftad	10:-
Kaukazaj rakontoj	10:-
Kiuj semas plorante	30:-
Kredu min, sinjorino	70:-
La fenomeno esperanto	50:-
Malsata ŝtono	15:-
Pasko, de Strindberg	5:-
Printempo de morto	10:-
Tra lando de indianoj, inb.	15:-
Tra lando de indianoj, häftad	10:-

## Solvo

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	F	L	A	M	I	S		T	R	E
2	R	E	D	A	K	T	O	R	O	N
3	E	P	O	K	O		R	I	M	I
4	N	O	R	E	N	A	N		A	R
5	E	R	O	D	O		A	K	N	O
6	Z	O	N	O		A	M	A	T	
7	U	N		N	E	G	A	T	I	V
8	L		V	I	R	A	N		K	E
9	A	L	E	O		S	T	R	A	T
10	N	U	A	N	C		A	L	N	O

Solvo de la krucvortenigmo  
en La Espero n-ro 1/1994



Malmö Esperantoförening  
Kronetorpsg 94  
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

## Ŝatata seminario, kiu vekis esperon pri pliaj

La 16an kaj 17an de aprilo Sveda Esperanto-Instituto aranĝis en Jönköping, kunlige kun sia jarkunveno, seminarion pri **La lingvo en la centro**. Preskaŭ kvindek da partoprenantoj allogis la programo de la du tagoj kaj la prijuĝo je la fino de la seminario estis unuanima: Faru tiajn seminariojn tradicio!

Jam la ĉirkaŭaranĝo de la seminario montriĝis plej taŭga: la komfortaj ejoj de la altlernejo Vätterbyggdendens folkhögskola, la bela printempa vetero, la atingeblo de Jönköping. La aranĝo okazis kunlabore kun la altlernejo, kiu kontribuis per unu, svedlingva, prelego. Cetere la prelego okazis en esperanto.

### Altrangaj fakprelegoj

Du prelegistoj kontribuis per prilingvaj prelegoj: la berlinano **Detlev Blanke**, konata interlingvisto, kaj **Ebbe Vilborg**, ĝuste nun finpretiganta la kvaran volumon de sia *Etimologia Vortaro de Esperanto*.

Ambaŭ estas altrangaj spertuloj kaj iliaj prelegoj temis pri iliaj fakoj.

Detlev Blanke parolis erudicie pri planlingvoj: iom pri la ideoj malantaŭ ili, pri la teoriaj bazoj, kun kategoriigo de la diversaj proponoj. Plej interese estis vidi kaj aŭdi kiel diversaj planlingvoj fakte aspektas. Li koncentriĝis al la historie plej signifaj kaj al kelkaj el la pli novaj proponoj. La projekcibildoj, kiujn li uzis, estis parte germanlingvaj, ĉar tio estis la materialo, kiun li uzas en siaj prelegoj ĉe la berlina Humboldt-universitato.

La prelego de Ebbe Vilborg temis kompreneble pri lia *Etimologia Vortaro de Esperanto*. Li priskribis, kion li utiligas en sia laboro kaj donis aron da ekzemploj pri vortoj, kiuj kaŭzis problemojn. Evidentiĝis, ke temas pri temporaba detektivado en libroj kaj malnovaj gazetoj, ke ankaŭ akceptitajn "verojn" pri la origino de iuj vortoj oni devas kontroli kaj eventuale redefini.

Ke lia prelego vekis intereson ĉe la aŭskultantoj pruvas la fakto, ke ĉiuj haveblaj ekzempleroj de la unua volumo de EVE rapide elĉerpiĝis. (Ne panikiĝu: en la stokejo de Eldona Societo en Malmö restas pliaj!)

### Kulturo kaj instruado

**Odd Tangerud** el Norvegio aldonis plian dimension al la seminario: kulturon. Lia prelego temis pri nordia literaturo en esperanto (precipe norvega kaj islanda), de kiu li donis plurajn ekzemplojn en sia trankvila, klara recita voĉo. Je alia okazo li prezentis elektitajn scenojn el *Ifigenio en Aŭlis*, antikva greka dramo, de kiu li mem tradukis partojn.

Sed prilingva seminario sen prituŝo de lingvoinstruado ne estus plena seminario. **Lars Forsman**, nia nun plej konata esperanto-pedagogo, montris per kelkaj ekzemploj el sia instru-materialo, kiel oni povas varii uzante la saman komencan bazon.

Tute fine de la seminario, kiam kelkaj partoprenantoj jam ekrapidis al siaj trajnoj, **Bertil Andreasson** prezentis, kiu instrumaterialo estas hodiaŭ havebla, donante ankaŭ kelkajn proponojn, por kio la diversaj libroj plej bone taŭgas.

### Kaj fine...

Ne eblas forgesi, ke ekzistas homoj, sen kiuj seminario, kun kiom ajn bonaj prelegantoj, neniam okazus. **Bo Sandelin** kaj **Märta Andréasson** estas la du personoj, kiujn ni devas danki por la organiza laboro, sed ni ne forgesu pri **Inga Johansson**, kiu dum ambaŭ tagoj respondecis pri la libroservo.

Kaj ni esperu, ke eblos realigi similan aranĝon ankaŭ venontjare.

Vulpo mienon ŝanĝas,  
sed plue kokidojn manĝas.

[ PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSTITA PER LA LITERTIPO ELLINGTON ]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Plu ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAKSO 08-712 39 93

Franco Luin